# Informilano

Informilo de Milana Esperanto Klubo

**ANNO LVIII** **Gennaio - Febbraio 2009**


## INDICE


- I nostri prossimi venerdì
- Cena dell'amicizia
- Quote di iscrizione al Circolo Esperantista
- Quote U.E.A. per l'anno 2009
- 94-a Universala Kongreso de Esperanto
- Abbonamenti per l'anno 2009
- Congresso italiano di Esperanto a Cassino
- Concorso Marelli 2009
- 8a Eŭropa Esperanto-kongreso
- La 82a internacia Kongreso de S.A.T. en Milano
- Ancona: premio Zamenhof e premio Stoppoloni
- Elstara stud-kunveno en florenco
- Internacia jaro de lingvoj: la fina konferenco
- Memorinda seminario en Napolo
- Estrarkunsido
- Niaj pasintaj vendredoj
- Klaĉangulo
- Notizie dal mondo



**Circolo Esperantista Milanese**

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 *(solo venerdì sera)*

*e-mail:* esperantomi@infinito.it

*rete:* http://milano.esperantoitalia.it/

*C.C.P.* 26448209

## I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ — ore 21,15

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**Venerdì 9 gennaio**
Il primo programma del nuovo anno come al solito è la
**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 16 gennaio**
Prosegue la simpatica tradizione di trovarsi in pizzeria (ore 19.30 alla *Pizzeria Giardino* - Via Mac Mahon 104. Prenotarsi in sede o da Rodari, tel. 022364190) e poi in sede il s-ano E. Rodari presenterà:
**L'ITALIANO: POCO SNATURATO MA EMARGINATO**
facendo ascoltare un qualificato esame del prof. Lombardi Vallaudi che smentisce un vero suo snaturamento da parte dell'inglese. Però il problema grave è il suo accantonamento internazionale e non solo.

**Venerdì 23 gennaio**
si ritrovano i fedeli della
**LINGVA RONDO**

**Venerdì 30 gennaio**
oni lernas per
**MOZAIKO**

**Venerdì 6 febbraio**
**TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTISTAN GAZETARON**

**Venerdì 13 febbraio**
Dopo il conviviale incontro in pizzeria (stavolta a *Il Faraone* in via Masolino da Panicale 13, con le solite modalità) un programma del tutto inusuale ci attende in sede. Sarà con noi la s-anino brasiliana Manuela Tourinho Oruè che presenterà
**SAMBA: ORIGINOJ KAJ KATEGORIOJ**
facendo ascoltare anche diversi brani musicali.

**Venerdì 20 febbraio**
nuova tappa della
**LINGVA RONDO**

**Venerdì 27 febbraio**
**KONVERSACIA RONDO**

**Venerdì 6 marzo**
**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

**Venerdì 13 marzo**
Il programma è ancora da definire, ma dovrebbe prevedere una interessante serata preceduta dal conviviale incontro in pizzeria.

## CENA DELL'AMICIZIA

Per la nostra tradizionale cena, che annualmente riunisce samideani ed amici, ci ritroveremo tutti al noto ristorante *"La Bomboniera"* di via Scalvini 4 (parcheggio al n° 10) *il 26 febbraio prossimo,* giovedì grasso. Il menu previsto è come sempre molto ricco e variegato ed il prezzo è rimasto invariato: 36 euro.
Un motivo in più per non mancare all'appuntamento con gli amici e vivere insieme una bella serata. Per le adesioni rivolgersi al segretario Rodari (tel. 02 2364190).

## QUOTE DI ISCRIZIONE AL CIRCOLO ESPERANTISTA

Anche per quest'anno rimangono invariate le quote d'iscrizione al CEM ed alla FEI, come deciso dalle rispettive assemblee. Pertanto ecco la loro tabella completa, con le diverse possibilità di scelta e sempre comprensive dell'iscrizione ad entrambe.
Le quote solo locali del CEM, poste tra parentesi, sono riservate esclusivamente a qualche s-ano che è già socio FEI e desidera iscriversi anche da noi.

| | | |
|---|---|---|
| Socio ordinario | (29,50) | *50,00* |
| Socio giovane | (14,75) | *25,00* |
| Socio familiare | (14,75) | *25,00* |
| Socio sostenitore FEI e CEM | (88,50) | *150,00* |
| Socio garante FEI e CEM | (295,00) | *500,00* |
| Socio ord. FEI e sost. CEM | | *109,00* |
| Socio sost. FEI e ord. CEM | | *106,00* |

Sono *Soci giovani* con quota ridotta *i nati dal 1° gennaio 1985.* Il *Socio familiare* è allo stesso indirizzo del socio titolare.

## QUOTE U.E.A. PER L'ANNO 2009

| | | |
|---|---|---|
| **MA-(T)** | Membro individuale con rivista e Jarlibro | € 59,00 |
| **MJ-(T)** | Membro individuale con solo Jarlibro | € 24,00 |
| **MG -** | Membro con libro guida del movimento esperantista | € 10,00 |
| **SZ -** | Adesione alla Società Zamenhof – senza diritto di appartenenza a categoria alcuna | € 118,00 |
| **SA -** | Semplice abbonamento a rivista Esperanto | € 38,00 |
| **PT -** | Patrona membro de TEJO (con Kontakto) | € 72,00 |
| **K-TO** | Abbonamento alla rivista Kontakto | € 23,00 |
| **(T)** | Per i giovani sino a 29 anni è compresa la rivista Kontakto (obbligatoria la data di nascita) | |

## 94-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**Bjalistoko - Pollando de la 25a ĝis la 1a de aŭgusto 2009**

Ecco le quote d'iscrizione valide fino al 31 marzo e dopo tale data:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 - | individua membro de UEA (ne inkluzivas MG) | 200,00 | *240,00* |
| 2 - | ne individua membro de UEA | 250,00 | *300,00* |
| 3 - | kunulo, junulo, handikapulo mem individua membro de UEA | 100,00 | *120,00* |
| 4 - | kunulo, junulo, handikapulo ne individua membro de UEA | 150,00 | *180,00* |

I versamenti si possono fare tramite la FEI, sul **c.c.p. n° 37 31 22 04** a essa intestato, o presso la **Banca Intesa, Ag. Milano 002 S. Gottardo, sul suo conto n° 36255-62 – cod. IBAN IT06 A030 6909 4460 0000 3625 562.**

Per il Congresso, dati i lunghi tempi di notifica dei vostri versamenti, specie in c.c.p. (e per l'UEA fa fede la data di pagamento da parte della FEI), si prega di spedire per lettera o fax l'iscrizione, o comunicarla telefonicamente. Grazie per la vostra cortesia.

## ABBONAMENTI PER L'ANNO 2009

Pubblichiamo l'elenco di iscrizioni e di abbonamenti ai periodici fino ad oggi pervenuti. Altri verranno pubblicati sulla nostra rivista se e quando verranno forniti.

Onde evitare errori si prega di *non inviare* abbonamenti per riviste non elencate qui o sulla nostra rivista, senza prima interpellare la FEI.

| | | |
|---|---|---|
| Iscrizione all'ILEI | Euro | 18,00 |
| Iscrizione all'UECI (con Katolika Sento) | " | 20,00 |
| Espero Katolika | " | 21,00 |
| Katolika Sento | " | 10,00 |
| La Ondo de Esperanto (sped. normale) | " | 38,00 |
| La Ondo de Esperanto (sped. aerea) | " | 43,00 |
| La Ondo de Esperanto (pdf, per posta elettr. *Fornire e-mail*) | " | 12,00 |
| Femina | " | 24,00 |
| Literatura Foiro | " | 36,00 |
| Juna amiko | " | 14,00 |
| dalla terza copia allo stesso indirizzo | " | 11,00 |
| Komencanto (bimestrale) | " | 18,00 |
| Monato (spedizione normale) | " | 49,00 |
| Monato (spedizione via aerea) | " | 53,00 |
| Monato (per posta elettronica: *fornire l'indirizzo di e-mail*) | " | 29,40 |
| Jaro (spedizione normale) | " | 5,00 |
| Jaro (spedizione normale) | " | 9,00 |

Gli abbonamenti possono essere effettuati tramite la FEI, come già sopra indicato, oppure tramite il Circolo Esperantista.

**Si raccomanda di fare sollecitamente gli abbonamenti** perché non si può garantire l'invio degli eventuali arretrati. Si fa inoltre notare che gli abbonamenti pervenuti dopo marzo, dati i costi, verranno raggruppati e spediti all'editore alla fine di ogni mese.

## CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO A CASSINO

Come è noto esso si svolgerà in questa cittadina, vicina alla famosa abbazia di Montecassino, dal 27 agosto al 3 settembre. Per motivi tecnici (leggi: il cronico ritardo della nostra rivista) è stato spostato al 31 gennaio il termine utile per pagare la quota d'iscrizione di € 60 (o 30 per familiari, giovani, handicappati e stranieri). Poi si passerà a quella del periodo successivo, rispettivamente di 75 e 37,5 euro.

Per informazioni e iscrizioni, tutto in rubrica a www.esperantoitalia.it

## CONCORSO MARELLI 2009

In attuazione delle disposizioni testamentarie del compianto s-ano Pierluigi Marelli, della delibera del C.N. FEI del 3.10.93 e di quella del Consiglio di Amministrazione del Fondo Marelli del 9.11.97, è

indetto un concorso per la premiazione di giovani in possesso del diploma di esperanto di 3° grado.
Il premio consiste in un viaggio gratuito a Bialystok (Polonia) per poter partecipare al Congresso Universale di Esperanto dal 25 luglio al 1° agosto 2009, oppure al Congresso Giovanile Internazionale che si svolgerà a Liberec (Repubblica Ceca) dal l8 al 25 luglio 2009.

**Requisiti -** possono partecipare al concorso i giovani con:
a) cittadinanza italiana;
b) età minima l8 anni, età massima 30 anni compiuti il 01-01-2009;
c) possesso del diploma di 3° grado, rilasciato dall'Istit. It. di Esper.
d) nessuna precedente premiazione nello stesso concorso;
e) iscrizione alla FEI.
I membri del C. d A. ed i loro familiari non possono concorrere.

**Definizione del premio**. Il premio coprirà le seguenti spese:
a) iscrizione al Congresso;
b) viaggio con mezzo di trasporto più economico;
c) soggiorno nella località congressuale in alloggi universitari od equivalenti;
d) partecipazione ad una eventuale gita programmata dal Comitato Organizzatore del Congresso, intercalata nel corso del Congresso, con esclusione quindi di ogni attività turistica antecedente o susseguente al Congresso;
e) assicurazione per l'assistenza sanitaria e contro gli infortuni, in assenza di altre assicurazioni o accordi internazionali, nelle forme e nei limiti fissati dal Consiglio di Amministrazione.
La somma che il Comitato destinerà per ciascun vincitore sarà devoluta in due tempi: l' 80% circa anticipatamente, il saldo a rendiconto spese e previa relazione in esperanto sul viaggio fatto.

**Modalità di presentazione della domanda:** entro il 15.2.2009 dovranno pervenire alla Feder. Esper. Ital. le domande dei concorrenti ed i relativi allegati: certificato di cittadinanza, certificato di nascita, attestazione di conseguimento del diploma di 3° grado (il tutto in carta semplice), oppure autocertificazione con allegata fotocopia di documento di identità valido.
Il candidato si impegna a far avere, al rientro dal viaggio, una relazione scritta sull'esperienza vissuta.

**Per ulteriori informazioni:**
FEI – Via Villoresi 38, 20143 MILANO MI (tel./fax 02 58100857).
Istituto Italiano di Esperanto – (Prof.ssa Laura Brazzabeni, tel. 339 522925 - laura.brazzabeni@alice.it)

## 8a EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO

Ĉijare ĝi okazos en fama **Herzberg Am Harz – la Esperanto-Urbo,** kune kun la 86a Germana Esperanto-Kongreso, de la 28a de majo ĝis la 3a de junio.
**Ĉeftemo:** Esperanto por multkultura Eŭropo.
Je la unua fojo en la historio la Esperanto-movado ĝi forlasos sian kutiman kongresejon kaj prezentos sin en la urbo multloke kaj multflanke. Ekzemple, jen kelkaj okazaĵoj:
- publika kantado en urbo kun lokaj infanoj kaj esperantista kantisto
- la kongresanoj partoprenos en la la procesio okaze de la tradicia popolfesto
- estas planitaj vizitoj al firmaoj, lernejoj, kluboj.

Atendos vin varia kulturprogramo dum la nacia vespero: multaj artistoj, muzikistoj, dancistoj kaj ankaŭ prezentantoj el la loka gimnazio, kiu donos hejmon por nia kongreso. Ankaŭ dum la internacia vespero vi trovos abundan muzik- kaj teatroprogramon.
Dum la kongreso okazos ankaŭ Eŭropa Konferenco organizata de Eŭropa Esperanto-Unio sub la temo: "Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo".
**Informoj kaj aliĝilo** troveblas ĉe:
http://www.gek-eek.esperanto-urbo.de/page.php pid=62384463

## LA 82a INTERNACIA KONGRESO DE S.A.T. EN MILANO

Okazos en Milano ek de la 18a ĝis la 25a de julio 2009 la 82a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), asocio naskiĝinta en la jaro 1921 pro merito de esperantistaj maldekstruloj laŭ diversaj tendencoj politikaj kaj kulturaj, kiuj per esperanto donis spuron de egaleca komunikado al internaciaj rilatoj kaj valorigis esperanton kiel lingvo por kultura kresko por tiaj tavoloj de la popolo kiuj ne havas ilojn kaj eblecojn.
Temo de la kongreso: Elmigri senlime, vivi sennaciece.
Ĉiuj informoj kaj ĝisdatigoj estos en la retpaĝo: http://sat.arciesperanto.it

*Andrea Montagner* Prezidanto OKK

## ANCONA: PREMIO ZAMENHOF e PREMIO STOPPOLONI

Il Premio Zamenhof "Le voci della Pace", giunto alla settima edizione, si è tenuto venerdì 28 Novembre anche quest'anno nel Teatro Sperimentale di Ancona (tutto esaurito, affollato da circa 450 persone quasi totalmente non-esperantiste). Promossa dalla Provincia di Ancona, organizzata dalla F.E.I. in collaborazione con "Economia&Cultura" con il patrocinio della Regione Marche e del Comune di Ancona, la manifestazione, iniziata poco dopo le ore 21, è stata presentata come negli anni precedenti da Francesca Alfonsi della RAI e da Andrea Carloni, e si è aperta con una esibizione tenerissima (ideata da Daniela Bottegoni) di bambini della scuola materna (alcuni di essi extracomunitari), con in mano bandierine di vari paesi, che hanno cantato in Esperanto indossando una maglietta con una grande stella verde e la scritta "Paco", suscitando un grande serie di applausi. È seguita la consegna dei premi (la scultura "il viaggiatore" di Floriano Ippoliti, che rappresenta l'umanità che alza la mano e guarda lontano e vuol significare l'anelito dello spirito umano alla scoperta dello spazio e del tempo), assegnati come ogni anno a tre personaggi impegnati per la pace.

Il primo a Lella Costa (per il suo impegno per una cultura di pace contro ingiustizie e discriminazioni, tra cui la battaglia contro la violenza sulle donne) che ha sottolineato come il mondo sia dominato dal pensiero maschile e ha ricordato le parole di Frost ("non bisogna mai accontentarsi di ciò che è a portata di mano, altrimenti a cosa servirebbe il cielo?"), alla quale il premio è stato consegnato dal Presidente della Provincia di Ancona Patrizia Casagrande. Il secondo a Ernesto Olivero (per l'impegno al soccorso degli emarginati nel rispetto di culture e religioni attraverso gli istituti da lui fondati: il 'Sermig', Servizio Missionario Giovanile, e l'"Arsenale della Pace" per l'aiuto di milioni di persone ad altri milioni di persone dei paesi poveri), bloccato a Torino dal maltempo, che ha provocato annullamento di voli e ritardo di treni; il premio è stato quindi consegnato a Laura Giacchello, del 'Sermig', dal Presidente del Consiglio Comunale Giuseppe Frisoli. Renato Corsetti, Presidente della FEI ha consegnato il terzo premio a Giovanna Cipollari per l'associazione Centro Volontari Marchigiani (volontari per il mondo, attualmente impegnati in progetti idrico-sanitari in Etiopia, che si impegnano anche nella formazione degli abitanti dei paesi poveri) che si è espressa contro la cultura dei consumi che tende a dividere anziché ad unire e porta ad un'iniqua distribuzione delle risorse nel mondo.

Il Premio Stoppoloni "Le integrazioni impossibili" è stato consegnato da Silvio Stoppoloni all'associazione 'Libera', per il suo impegno contro le mafie. Il rappresentante dell'associazione ha sottolineato come l'impegno in tal senso non deve essere solo della magistratura ma di tutta la società civile. È stata poi ricordata Elena Passini, di Falconara, scomparsa nel 2007, già volontaria della Tenda di Abramo (per i senza dimora) e presidente di 'Free Woman'. Aldo Grassini, invitato sul palco, ha detto che "non c'è pace senza cultura di pace, non c'è pace senza comprensione" e che gli esperantisti sono un esempio della capacità di comprendersi in modo paritario: chi parla esperanto "si sente dovunque come a casa sua". In finale di serata, applauditissimo lungo recital di Lella Costa, intitolato "Lezione spettacolo da Amleto", un curioso monologo sul tema di Amleto, con spiegazioni storico-letterarie, battute d'attualità, recitazione di piccole parti del testo scespiriano (di cui Lella Costa ha interpretato, di volta in volta, tutti i personaggi).

Si è così conclusa con un grandissimo successo anche questa edizione del Premio, brillantemente ideato dal prof. Grassini.

*Aldo Foà*

## ELSTARA STUD-KUNVENO EN FLORENCO

La 25an de novembro okazis altnivela kunveno kiu revalorigas nian esperantistan mondon, ofte en frustracio ĉar ĝi ne sukcesas atentigi la aliajn pri esperanto kaj ĝiaj celoj, konvinki ilin aliĝi al la movado aŭ al kursoj, ktp. La malkontentiga ĉeesto de ekstera publiko okaze de ia prelego kaŭzas seniluziiĝon kaj dubojn pri niaj kapabloj kaj elektoj. Kelkaj eĉ imagas kaŝitajn komplotojn aŭ malamon kontraŭ ni kaj sugestas ne uzi tuj la vorton "esperanto" komence de ia organizaĵo aŭ de propaganda agado, sed nur poste. Ĉifoje en la prestiĝa "Salono de Ducent" en la komunuma "Palazzo Vecchio", sekve al proklamo de Unuiĝintaj Nacioj pri "2008 Internacia Jaro de Lingvoj" oni organizis gravan stud-kunvenon kun socia kaj lingva temo: "Homaj kaj lingvaj rajtoj", kunlabore kun la Komunumo, reprezentita de la asesoro pri kulturo Giani, kun la Itala Nacia Komisiono de UNESCO, kiu sendis prof.on De Nicolò, kun la

Akademio de Crusca (kies sidejo estas Florenco), kiu partoprenis pere de prezidanto Maraschio kaj de sia honora prezidanto, la fama prof. Sabatini, kaj fine kun svisa Ambasadejo, fare de d-rino Ruth Theus. Ĉiuj alportis siajn saluton kaj konsenton. Poste jen ok prelegoj, fare de prof. Sabatini kaj aliaj sep universitataj docentoj (du el svisaj Ĝenevo kaj Friburgo). La temoj pritraktitaj estis: Florenco, placo de eŭropaj lingvoj – ecologio de lingvoj – plurlingveco kaj traduko en antikva Mediteraneo – la itala kiel rimedo en kompetentoj de eŭropaj lingvoj – rilatoj inter lingvoj kaj ekonomia evoluo - la angla en universitato – kio ne taŭgas en kosma lingvo kaj la kazo de la lingvo Lincos – plurlingveco ĉe UNO kaj la kazo de la araba kaj de aliaj oficialaj lingvoj. Koncernaj temoj, kie Esperanto neniam aperis, ankaŭ se poste pluraj prelegantoj (nur du estas s-anoj) tuŝis ĝin dum sia parolado. Do, la tuta manifestacio sin prezentis kiel grava, serioza scienca analizo pri lingvaj aferoj kaj problemoj, taŭga por ĉiuj interesiĝantoj pri tiu kampo. La aŭskultanta publiko? Malpli ol sesdeko da personoj, inter kiuj la neesperantistoj estis ses-ok, sen kalkuli la pedelojn. Eble estas la lingvaj temoj kaj problemoj kiuj ne tro interesigas la plimulton, pro rezignacia akcepto aŭ pro ŝajna negraveco. Esperanto estas nur ero de tiu ĉi situacio.

## INTERNACIA JARO DE LINGVOJ: LA FINA KONFERENCO

Ĝi okazis ĉe la sidejo de Unesko en Parizo la 15-a de decembro 2008, en la Zamenhof-tago. Iniciato de la pola ambasadorino ĉe Unesko, Maria Wodzynska-Walicka, ĝi estis organizita de la Pola kaj Litova Ambasadoj kunlabore kun U.E.A. Ĝi ricevis oficialan karakteron fare de Unesko: la Ĝenerala Direktoro Koiichiro Matsuura estis ĝia ĉefa invitanto. La konferencon prezidis Barbara Despiney, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, kaj disvolviĝis en du lingvoj: esperanto kaj franca. La estrinoj de la du Ambasadoj, Walicka kaj Marĉiulionyte, bonvenigis la publikon el 12 landoj, kiu plenigis la 400-lokan salonon, kaj poste Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA, legis salutmesaĝon de prezidanto Probal Dasgupta kaj de Carlo Minnaja, vicprezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj.

La enkondukan paroladon pri la Internacia Jaro de la Lingvoj faris Mauro Rosi, reprezentanto de la Ĝenerala Direktoro Matsuura, kiu siatempe per mesaĝo en multaj lingvoj enkondukis la Jaron kaj skizis ĝiajn celojn. Emociigan prelegon pri Zamenhof faris lia nepo d-ro Zaleski-Zamenhof, substrekante la aktualecon de liaj idealoj. Pri Zamenhof kiel lingvisto prelegis universitata prof. Henriette Walter, kiu reliefigis el lingvistika vidpunkto la avantaĝojn de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj. La ne-esperantistoj povis gustumi ĝin per provleciono el la ĵus lanĉita DVD-disko "Esperanto estas". Poste Estelle Maria Loiseau parolis pri "Esperanto en tria jarmilo". Sekvis debato kaj regalado.

## MEMORINDA SEMINARIO EN NAPOLO

Ĝi disvolviĝis de la 6a ĝis la 8a de decembro ĉe la bela sidejo de UNUCI, kiu gastigas la napolan grupon "Harmonio kaj Progreso" kaj ankaŭ ĉifoje ĝiaj s-anoj organizis ĉion altnivele, per granda efikeco kunigita al sindonema sinjoreco kaj al rafinita gastamo, rimarkebla ĝuste en la detaloj. Dankojn kaj gratulojn al ĉiuj, ekde la prezidantino M. Rosaria Esposito kaj la poeto Nicolino Rossi ĝis ĉiu helpanto. La seminaria temo inspiriĝis el la "internacia jaro de lingvoj 2008" kiel klarigis d-ro Corsetti dum sia enkonduka prelego, post la inaŭguraj salutoj de la du organizantoj jam cititaj, de generalo Della Vita, ĉefa estro de UNUCI, de d-rino Cagnazzi, estrino de la napola UTESPED, kaj fine de prof. Danise, prezidanto de la napola UNESCO-Klubo, kiu pritraktis la temon je la vidpunktoj de tiu Internacia Organizo kaj de la malmultaj eblecoj de sia loka klubo. En sia dimanĉa prelego, inĝ. Clerici analizis denove la nuntempan situacion de nia movado kaj la estontajn perspektivojn kun optimismaj konkludoj. Post li, jen prof. Iannaccone kiu, substrekante ke la skribaĵo ŝanĝis la mondon (fakte estas certe konata nur la historio de la homaro de la lastaj jarmiloj) pritraktis la gravecon de verkistoj kaj de eldonistoj por la defendo kaj la disvastiĝo de la gepatra lingvo. S-anino A. Lowenstein prizorgis la lastan matenan prelegon ilustrante novan pli simpatian bildon de Nerone, kiel li aspektas en ŝia eldonota romano "Morto de artisto", kaj la situacion de la iama napola regiono, libertempejo kaj kampar-domejo por la riĉaj kaj gravaj romianoj. Posttagmeze prof. Grassini prelegis pri lingva demokratio, kiu estas politika problemo, asertante ke esti neŭtrala ne devas signifi esti indiferenta. Poste prof. Nino Vessella priskribis la apartajn situaciojn de lingvoj, precipe en centr-orienta Afriko, kaj fine inĝ. Bottero en sia "Nova printempo de

Esperanto" proponis multajn agojn kaj taktikojn por ege disvastigi Esperanton: bedaŭrinde pri ili ne sufiĉas konvinki la esperantistojn.
Apartan taskon plenumis Nicolino Rossi: prizorgi "Konversaciojn pri esperanta literaturo". Nia poeto ensorĉis la ĉeestantojn danke al siaj kompetenteco kaj oratorarto. Flanke okazis eĉ kurso por kelkaj komencantoj. La du vesperaj distraj programoj estis vere napolaj: lokaj kantantoj, pianisto, rafinitaj parolantoj, rakontisto, jese akceptis la alvokon de la esperantistaj amikoj kaj brile aranĝis du variajn vervoplenajn spektaklojn. Duontaga vizito de la urbo kaj gaja komuna vespermanĝo estis la du kromaj eroj de tiu ĉi plensukcesa seminario. Nur la samtempa kunsido de nia Nacia Konsilantaro fiaskis: neĉeestis unu troa estrarano por havi laŭleĝan numeron. Estis pluraj tiuj kiuj vere estis malebligitaj partopreni pro malsano aŭ seriozaj kialoj, sed ne ĉiuj: por tiuj ĉi lastaj... plibone silenta vualo.

## ESTRARKUNSIDO

La lasta kunsido de la jaro okazis la 7an de novembro. Oni legis la antaŭan protokolon, oni konstatis ke la prelego ĉe Biblioteko Tibaldi estis pli sukcesa kompare kun la aliaj antaŭaj, dum s-anoj Daminelli kaj Gianni Conti informis pri la situacio de la novaj kursoj: fare de CEM (unu-trigradaj) kaj ĉe UNITRE de Milano, Cesano Maderno kaj Bollate. Tiu-ĉi lasta estas nova kaj aliĝis dekvino da lernantoj. Oni sciigis ke oni ne povis organizi la deciditan "AgoTago" pro la nova burokrata komunuma regularo: peto antaŭ 30 tagoj almenaŭ kaj pluraj dokumentoj. Postaj kontaktoj klarigis ke la dokumentaro simpliĝis por starigi simplan surstratan gazebon, sed tamen nun necesas ricevi la komunuman patronecon por elekti gravajn stratojn kiel Straton Dante kaj aliajn. Oni decidis starigi la informigan gazebon la 14an de marto 2009 en strato Dante se ni sukcesos pri patroneco aŭ alternative en bulvardo Buenos Aires. Oni denove debatis pri ia organizaĵo ĉe unu el la kvartalaj strukturoj. Por prelego estas preferenda la centran, ĉe la Kvartala Konsilio. Laŭ la informoj la salonon oni disponigas malmultekoste, sed se la iniciato estus taksata tre interesa fare de la estraro, eĉ monhelpo estus ricevebla. Oni klopodos atingi tiun celon.
Oni aprobis la proponon de la prezidanto aligi iamaniere la milanajn bibliotekojn al la nacia kampanjo, kaj ankaŭ tiun kontroli ĉu eblas prelegi pri Esperanto ĉe librovendejoj. La sekretario informis ke la Provinco ne aljuĝis subvencion al nia prezentita projekto kaj s-ano Gianni Conti rakontis siajn tre pozitivajn spertojn de instruisto ĉe UNITRE utiligante la instrumaterialon de Benson.

*E.R.*

## NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ

Nia s-ano d-ro *Tresoldi* revenis ĉe nin por prezenti esperantan filmon la 14an de novembro. La vespera programo komenciĝis per la livero, fare de la prezidanto *Polerani,* de la diplomoj de unua kaj dua gradoj al la partoprenintoj en la milana ekzamensesio de junio.
La preleganto poste enkondukis la temon per konciza historia resumo de la situacio de la filmoj kaj de la filmistoj en Esperantujo. Malmulto en ambaŭ kategorioj. En pluraj filmoj, ankaŭ famaj, esperanto estis uzata nur parte kun apartaj celoj: ekzemple por nomi stratojn aŭ butikojn en "*La granda diktatoro" de Chaplin* aŭ por tre mallongaj mesaĝoj en la usona sciencfiksio *"Gattaca".* Sekvis la projekciado de la unua vera filmo en esperanto: *"Angoroj"*, de la jaro 1964. Ĝi estas blank-nigra krimfilmo, pli-malpli unuhora. Pravis la preleganto kiam antaŭe asertis ke Esperanto posedas pli alt-kvalitajn verkojn en literatura, teatra kaj kanta kampoj.
Grava prelego okazis la 5an de decembro, la zamenhofa monato, pere de d-ro Nicola Minnaja, alveninta al nia klubo, kiu havis la honoron lin havi kiel membron dum pluraj jaroj. La titolo mem "Ĉirkaŭ la mondo per Esperanto" enfokusigas la temon: rakonti travivitajn okazaĵojn fare de s-anoj en nia aparta mondo, kie regas amikaj kaj helpemaj sintenoj en la interrilatoj. Kiel signifoplene resumas Enrique kiu en sia tttejo http://esperantofre.com/book/booke.htm kolektas aron da tiuj travivaĵoj: *"Kiam ili parolis al mi en la angla, estis ĉar ili volis vendi ion al mi". Kiam ili parolis Esperanton al mi, estis ĉar ili volis esti miaj amikoj".* La unua parto de la prelego estis dediĉita al pluraj selektitaj okazaĵoj el tiu ĉi fonto.
Poste d-ro Minnaja malfermis la riĉan memorlibron (kiu komenciĝis en la 1939a jaro) de sia familio, tre konata en la esperantista movado, kaj li revivigis renkontiĝojn kun pluraj famaj eminentuloj, feliĉajn kaj amikajn kunestadojn kun s-anoj el la tuta mondo, k.t.p. Tre interesa plonĝo en la pasintecon.
Vendrede la 19a de decembro la tradicia festo de Kristnaska Paĉjo

en ĝoja etoso fermis la kluban jaron: kiel kutime multnombraj ĉeestantoj, pluraj jnfanoj, sakoj da donacoj, panetonoj, tostoj, bondeziroj, k.t.p.

## KLAĈANGULO

La esperantistoj estas avangardo ne nur en lingvaj kampoj: ili havas en si la emon ŝanĝi aŭ renovigi la ilojn por atingi la celon. Kroma pruvo? La aliĝilo al la 76a Itala Kongreso en Kasino! La italoj ne miskomprenu! Ĝi estas nur la maltrafa traduko de la nomo Cassino, ĉar la tiama signifo perdiĝis. Sed slange tiu substantivo itale signifas ĥaoson kaj esperante, sed la Akademio ne agnoskas ĝin, kongresan organizon. Ĝi, ĉiam slange, derivas el la verba formo kazini kaj nia Kazini, la respondeculo pri Kongresoj, povus faciligi la komprenon.

............................................................

Oni renovigis ankaŭ la historion. Nur la esperantistoj konas la veron: .... super la urbo Kasino, kiun fondis en la jaro 529 sankta Benedikto.

Sed estus aldonenda ke Casinum kaj siaj romiaĵoj estas mitologio.

............................................................

Revolucia novaĵo estas peti al aliĝanto ĉu li estas vegetarano aŭ ne! La kialo? Ĉar viandoj povas esti kaj blankaj kaj ruĝaj, sed nur la vegetaloj povas esti verdaj! Simbolo en verda Esperantujo.

............................................................

Sed por helpi la cerbumadon, jen la lasta demando al ĉiu aliĝanto: (*mi pagis) la sumon....... por.......* Tro banale respondi ke oni pagas tiun ciferon "*por aliĝi*, aŭ *por mi* aŭ *por pagi*"! Tiu kiu skribos la plej trafan respondon dumkongrese ricevos premion de IEF (Itala Enigmistika Federacio).

## NOTIZIE DAL MONDO

**Pescara -** Più di un cento i presenti, comprese alcune autorità, che al Museo Vittoria Colonna, alla chiusura del Festival delle letterature il 15 dicembre, hanno assistito allo spettacolo "Doktoro esperanto" di M. Migliucci. Molte richieste di materiale ed anche iscrizioni ai corsi.

Un successo del neonato Gruppo locale e delle prof. A. Colacicchi.

**Lucca -** Grazie alla collaborazione degli esperantisti locali e di altri, anche quest'anno la FEI ha positivamente partecipato dal 30 ottobre al 2 novembre scorso alla manifestazione "Lucca Comics" allestendo e presidiando un visitato tavolo informativo.

**Cracovia (Polonia) -** La 42° Conferenza Internazionale dell'ILEI, la lega degli insegnanti d'esperanto, qui si svolgerà dal 17 al 25 luglio. Su www.ilei.info tutte le informazioni, modulo d'iscrizione, ecc.

**Barcellona -** Ben 130 i partecipanti alla 16° Settimana Internazionale di Esperanto, Cultura e Turismo, organizzata a Salou. Una targa in suo ricordo è stata posta dal Comune in via Esperanto.

**Torino -** Il Centro Esperantista Torinese, a seguito della cessione della propria sede, ha deciso di fare una oblazione alla FEI di € 1500 a titolo di ringraziamento e di contributo alla sua attività.

**San Vittore del Lazio -** Alla presenza di autorità e rappresentanti di molte associazioni, è stato acceso (quest'anno, a distanza, dal Padre Abate di Montecassino), l'albero di Natale più grande del mondo, entrato nel noto "Guinness dei primati". Alto 425 metri, tracciato su una collina con mille illuminazioni colorate e visibile da trenta km di distanza. Sulla cima brilla una grande stella verde dell'Esperanto.

**Roma -** È acquistabile per 9 euro "Nun mi pripensos – La ludo de la kreaj vortoj" un gioco divertente che anche aiuta a creare frasi, ecc.
Informazioni su: http://www.adessocipenso.it/nunmipripensos.htm
Venduto da: Fioriverdi *di Claudio Procopio* info@adessocipenso.it

**Lucca -** Per festeggiare il successo ottenuto dalla prima pubblicazione di Rat-Man in Esperanto, avvenuta in occasione di Lucca Comics & Games 2007, è stato ora edito uno speciale in 8 pagine sempre su Rat-Man e l'Esperanto, due mondi incontratisi finalmente sulla carta.

**Washington -** Lanciata la proposta di adottare l'esperanto negli USA, molti hanno aperto un dibattito, spesso favorevole, sul tema. Il sito: http://www.change.org/ideas/view/introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools

**Rotterdam -** Joop Kiefte è il nuovo amministratore di Pasporta Servo **-** il cui indirizzo elettronico è: "pasportaservo@tejo.org"

**Roma -** A Natale, tra i fedeli in piazza San Pietro ad ascoltare il Papa, fedele al suo collaudato programma, era presente anche quest'anno il drappello esperantista capitanato dall'infaticabile Gianni Conti con i suoi vistosi pannelli per ascoltare e sottolineare la benedizione papale in lingua internazionale.